



N-ro 57

2/1982 Junio

13a jaro

Redaktoro:

R. Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30



Poŝta E-stampo de IFER 1982

## Kluba informilo de ELF-AREK

Esperanto Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

**Redaktoro:** Rudolf Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

**Prezidanto/Kasisto:** Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3  
UEA-konto: 6295, Poŝtkonto: 51 57 85-4

**Stampobanko:** Werner Heimlich, D-3040 Soltau, Fröbelstr. 4

**Kotizo por la jaro 1982:** 15 maldekstre poŝtstampitaj IRK – aŭ 36:– sv.kr.  
Akceptas ilin s-ro Paulsson

**Se vi ne havas IRK:** Konsultu s-ron Burmeister

**Redaktofino:** 15.4.1982

ELF/arek-kunveno okazos 27-an de julio je la horo 17,00 ĝis 19,00 dum 67-a UK en Antverpeno.



Kore salutas,

*Diccon Masterman*

Diccon Masterman  
Konstanta Kongresa  
Sekretario

### Bonvenon al niaj novaj membroj!

Terttu Österman, Raatihuoneenk. 3 A/9, SF-24100 Salo 10

Kolektas poŝtmarkojn kun portretoj de verkistoj, kies verkoj estas tradukitaj en Esperanton kaj volus havi kovertojn, sur kiuj estas tiaj pm. Ankaŭ stampoj kun tiuj portretoj estus bonvenaj. Povas rekomenci per finnaj pm kaj UTK kaj per finnaj specialaj, neesperantaj, stampoj.

František Patera, čsa 1027, CS 50801 Hořice

Kolektas E-pm, E-sta kaj E-tutaĵojn. Deziras interŝanĝi tiujn filatelaĵojn.

H.F. Menges, Polenstraat 47, 2034 XL Haarlem, Nederlando

Li estas specialisto pri E-glumarkoj kaj desegnis kaj presigis jam multajn E-glumarkojn, aperintajn ne nur en Nederlando.

Henry Thomander, Skalbaggevägen 21, S-611 63 Nyköping

Li kolektas Esperanto-glumarkojn.

Adressango Revill

Eric Revill, Valmezo, Fford Conwy, Tal-y-Bont, GB-LL32 8SE, Britujo

Rolf Beau, Jacobstr. 9, DDR-7010 Leipzig

Kolektas E-glumarkojn, E-insignojn kaj E-filatelaĵojn. Li estas la prezidanto de la E-klubo en Leipzig.

Klaus Urban, Fetscherstr. 37, DDR 8019 Dresden

Li estas kolektanto de E-insignoj. E-gazetoj kaj de ĉiuj ceteraj Esperantaĵoj.

## Ni pri ni

Estas konate, ke kotizoj ni pagas ĉiam komence de la jaro. Tion bone scias ĉirkaŭ 40 niaj klubaj geamikoj. Pliaj 40 niaj klubaj geamikoj iam dum la kuranta jaro ekmemoros pri la kotizopago. Ili apartenas al la iom forgesemaj. Tria triono de nia membraro plene forgesas pri kotizado, ĉar la vivo estas tiom turbulenta. Inter ili ankaŭ estas multaj novaliĝintoj, kiuj eble en nia klubo ne trovis tion, kion ili atendis, kaj certe ankaŭ nia informilo ne plaĉas al ili. Kredu, ke konstante ni klopodas, ekstermi tiujn preserarojn, kiuj nin ĉagrenigas, sed ni tutsimple ne sukcesas tion. Vi devas scii, ke ni estas absolutaj laikoj. Tial bonvolu pardoni al ni kaj ignoru tiujn ofte nebelajn preserarojn. Kompreneble ne ekzistas medicina fekundo aŭ iuj ovaj kulturaj lingvoj, kredu ankaŭ, ke relative bone via redaktoro regas la akuzativon. Malgraŭ ĉiuj obstakloj ni jam vivas dektri jarojn. Kio estas la plej grava leĝo en nia klubo, tio estas la aktiva kunlaboro de ĉiuj niaj membroj. Sendu do viajn leterojn pri novaj Esperantaĵoj al via redaktoro, nur tiel eblas ekscii pri novaj materialoj. Neniu E-organizo informas nin pri tiuj "bagate-laĵoj", kiuj interesas nin. Do, kunagu!

## Nova E-pm

Kiam tiu ĉi informilo kuŝas antaŭ vi, jam ĉiu scias, ke okaze de la UK en Antverpeno aperis nova E-pm. Sed skribante tiujn ĉi liniojn, estas meze de aprilo, mi ne tro multon scias. Responde al mia letero sinjoro Franz Lujten de la LKK sciigis, ke 5an kaj 6an de junio oni uzas nederlandlingvan poŝtan unuataĝan stampon por la E-pm. Kaj, ke la Antverpena E-klubo aranĝas la vendadon de E-filatelajoj lige kun la nova E-pm. Pri la valoro de la nominalo atingis min malakordaj informoj kaj pri la aspekto de la nova E-pm oni komence de aprilo nenion sciis en Antverpeno. Eble, kiam nia sinjoro Paulsson presigas ĉi informilon, jam ni kapablas prezenti la markon. Do, bedaurinde nur tre magre mi povis informi vin.

## Nova E-pm el Hungario

Jam en la jaro 1973 la hungara poŝtministerio ĝojigis nin pere de poŝta karto kun surprisita E-pm, kaj nun, 1982, denove, sen antaŭa tamtamo. La nuna havas nominalon de 1 forinto, tarifo por enlanda afranko. La poŝtmarko montras sur blua fono terglobo kun du packolomboj kaj E-insignon. Supre en la marko aperas la teksto en nigra: 34a ESPERANTO/KONGRESO/DE IFEF kaj sube: 1 Ft/MAGYAR POSTA/1982.

La maldekstra flanko de la "vizaĝo" estas kovrita de bildo pri moderna elektra lokomotivo, insigno de IFEF, reloj kaj teksto 34. NEMZETKÖZI VASUTAS/ESPERANTO KONGRESSZUS/BALANTONFÜRED, 1982, MAJUS 2–8. (blua, ruĝa, nigra, verda).

En ruĝa aperas sur la poŝtkarto LEVELEZÖLAP (pk), maldekstre FELADO (sendinto) kaj meze ALLAMI NYOMDA ARA 1.40 Ft (vendoprezo). Ni E-filatelitoj kore gratulas al la organizintoj de tiu kongreso pro ilia bona filatela agado!

Aldoni ĉi-loke mi deziras, ke tiu 1-forinta-poŝtkarto jam estas la 6-a pk kun E-pm (AU 1949 kun 20 gr, PO 1962 kun 40 gr kaj 1.50 gr, PO 1966 kun 40 gr, HU 1973 kun 60 fileroj). Kaj nun mi intencis citi, la kioma E-pm estas tiu ĉi, sed la afero estas ne tute simpla: se ni nombras ilin laŭ aperintaj nominaloj (sen nombri la variaĵojn de div. filigranoj, dentumoj, sendentaj, diverskoloraj, renversitaj surprisoj, austra 20 gr sur pk/kov kaj sen la nazi-germanaj surprisoj), tiam ĝi estas 43-a laŭvica E-pm, la nova belga la 44-a.

Kompreneble mi scias ankaŭ, ke eĉ eblus eskludi la talonajn E-pm, kaj plie iuj opinias, ke sur pk presitaj pm ne estas pm, sed: ni ne tro komplikigu la tuton.

Eldontago de tiu poŝtkarto estis la 3a de majo laŭ sciigo en HUNGARA FERVOJISTA MONDO 2/82. Eldonkvanto ne citita.

Kiel eldontaĝa stampo bonege servas la sam-motiva E-stampo kun la dato de 3.5.82.



## Materialo por E-filatelaj ekspozajoj (II)

### B) Famaj Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto

Kompreneble, plej fama Esperantisto estis D-ro Zamenhof, pri kiu aperis multaj poŝtmarkoj, stampoj kaj tutaĵoj.

*Franz Jonas*, Prezidanto de Aŭstrio, estis mem aktiva en la laborista E-movado antaŭ 1933, post 1945 ĝis al sia morto praktikis Esperanton. (Aŭ 1137 k.a.)

*J.B. Tito*, Prezidanto de Jugoslavio, lernis Esperanton en la malliberejo kaj ĝin uzis en praktiko kelkfoje. (Ju 901-904 k.a.)

*Antonin Zapotocki*, Prezidento de CSSR, diris "... ke la universala lingvo Esperanto ... estas necesa ..." (Cs 716/717 k.a.)

*Sun Jat Sen*, Prezidanto de Ĉina Respubliko, estis aktiva Esperantisto, i.a. prezidanto de Ĉina E-Federacio. (R 2224, kaj multaj aliaj en pluraj landoj)

*Georgi Dimitrov*, Prezidanto de PR Bulgario, subtenis la agadon de la bulgaraj Esperantistoj. (BG: multaj, same en GDR k SU)

*Franz Josef I*, Imperiestro de Aŭstrio-Hungario, subtenis agadon de la Esperantistoj. Sendis i.a. saluttelegramon al UK en Krakow 1912. (Aŭ: multaj kaj sur poŝtmarkoj)

*Papo Pius X*, diris: "Mi vidas en la lingvo Esperanto valoran rimedon ... , Esperanto havas antaŭ si brilan estontecon". (Vatikano 163-166 k.a.)

*Papo Pius XI*, diris: "Mi rekonis laŭdindaj la klopodojn de la katolikoj-esperantistoj, ĉar ili per E kontribuas al la disvastigo de la "Sankta Evangelio". (Vatikano 53)

*Papo Pius XII*, diris: "... Kiel mondlingvo ĝi fariĝos post jaroj instrumento de paco kaj amikeco inter la popoloj." (Vatikano 177 k.a.)

*Papo Pius XIII*, diris: "Esperanto estas la universala lingvo de nia epoko." (Vatikano 268-270)

*Papo Pavel VI*, uzis Esperanton 1967 en sia Paska Mesaĝo (Vatikano 401-403)

*Albert Einstein*, giganto inter la sciencistoj, estis foje Alta Protektanto de SAT-Kongreso kaj diris i.a.: "Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo pri internacia lingvo". (GDR bloko de 1.-gmk-pm kaj pm en multaj aliaj landoj)

*W.F. Oswald*, fizikisto kaj filozofo, nobelpremiito, estis mem Esperantisto, poste transiris al IDO, faris multajn eldirojn pri Esperanto k internacia lingvo ĝenerale. (Svedio 643)

*William Ramsay*, fizikisto, nobelpremiito, diris, ke "la kemio ... , devas posedi universalan lingvon". (Svedio 519)

*Baden Powell*, fondinto de la skoitismo, diris: "Se vi deziras por via patrolo sekretan lingvon, eklernu Esperanton ..." (Gibraltaro 207 kaj certe aliaj?)

*B.V. Suttner*, pacifistino, nobelpremiitino, diris: "... Enkonduko de tiu ĉi lingvo en ĉiujn lernejojn estas la plej proksima celo ..." (Aŭ 1035)

*R. Tagore*, poeto kaj verkisto, diris: "Esperanto estas granda elpensajo ..." (Hindio 126, pk en PO, pm en SU k.a.)

*Julian Tuwim*, pola poeto, estis mem aktiva Esperantisto kaj praktikis ĝin dum multaj jaroj. (PL 1832)

*V.A. Obruĉev*, geografiisto, kaj lia filo Sergej O. estis aktivaj Esperantistoj. (USSR 2703)

*K. Ciolkovski*, "patro de la kosmonautiko", estis membro de SEU kaj faris pluraj favorajn eldirojn pri Esperanto. (USSR 2806 kaj multaj aliaj)

*L.N. Tolstoj*, verkisto, lernis Esperanton kaj favore parolis pri ĝi. (USSR 2346 k.a.)

*M. Gorki*, verkisto, faris faman kaj favoran eldiron pri Esperanto. (USSR 1030, kaj multaj aliaj, ankaŭ en aliaj landoj)

*A. Fersmann*, sciencisto, diris: "E estas la plej serioza provo krei internacian lingvon ..." (USSR ...)

*R. Rolland*, verkisto, estis Alta Protektanto de SAT-Kongreso, diris i.a.: "Esperanton oni devus instrui devige en ĉiuj mezlernejoj." (USSR 3062, CS 1466 kaj en aliaj landoj)

*J. Verne*, verkisto, ofte esprimis sian simpatian pri Esperanto. (Francio 1026 kaj multaj aliaj)

*Ludwig Renn*, verkisto, estis aktiva Esperantisto en la laborista E-movado, (E-pk de GDR kaj E-sta de GDR)

*K. Kalocza*, fama Esperantisto, verkisto. (E-pk de GDR kaj E-sta de GDR)

*Selma Lagerlöf*, verkistino, diris: "... Esperanto estas belsona, riĉa kaj esprimpova." (Svedio 434-436)

*Jean Jaures*, filozofo, diris "Esperanto – latino de demokratio". (Francio 1217 kaj aliaj)

*Lumiere*, kemiisto, diris: "... la uzo de E povus havi plej feliĉajn sekvojn ... por la universala paco ..." (Mallongigo!) (Francio 1033)

*N. Kuznecov*, nacia heroo de USSR, estis aktiva Esperantisto dum multaj jaroj. (USSR 3095)

*Pola Ribar*, nacia heroo de Jugoslavio, estis aktiva Esperantisto, partoprenis en multaj UK. (JU en jaro 1974, ...)

*R. Dakiĉ*, nacia heroo de Jugoslavio, estis aktiva Esperantisto en Beogrado. (JU en 1974 )



## Hildegard von Bingen

vivis en la 12a jarcento kaj tiu sanktulino laŭdire en la jaro 1150 havis vizion pri unueca lingvo por la mondo. La estraro de GEA ricevis el la postlasaĵoj de la E-pioniro Felix Epstein, kiu mortis 18an de januaro 1982 en sia 100a vivojaro, fotokopion pri manuskripto el la ŝtata arkivo de Wiesbaden de tiu sanktulino. Interese por ni, ke 1979 la federacigermana poŝto emis isis poŝtmarkon pri Hildegard von Bingen.

## Tudor Arghezi

Akademiano, verkisto, amiko de Esperanto

En la jaro 1980 aperis en la SR Rumanio pluraj filatelaĵoj pri Tudor Arghezi, kiu en Rumanio estas fama verkisto kaj kiu estis granda amiko de Esperanto laŭ "Pri internacia lingvo dum jarcentoj" de Dratwer. Li vivis de 1880–1967. Nia klubano Dr. Rosetel Prodanescu, C.P. 61–89, R-75 500 Bucuresti 61 akiris stokon de tiuj filatelaĵoj kaj proponas ilin interŝanĝe kontraŭ E-filatelaĵoj kaj E-insignoj. (Kompreneble nur post antaŭa interkonsento!)

- memoriga poŝta koverto kun enpresita pm pri Arghezi
- poŝta karto kun enpresita pm pri Arghezi (Blua)
- poŝta karto kun enpresita pm pri Arghezi (helbruna)
- UTK kun speciala Arghezi-pm
- Neuzita poŝtmarko
- maŝinstampo kun portreto pri Arghezi

## Goethe

estis nek Esperantisto nek amiko de Esperanto, kvankam iuj asertas ke Goethe diris: "Se ekzistus internacia lingvo kiel ekzemple Esperanto, meritus lerni ĝin". Tamen eblas ligi Goethe kun Esperanto-filatelo, ĉar ekzemple lia FAUST aperis en traduko de Bartelmess en Esperanto. Ekzistas multaj Goethe-pm kaj Goethe-stampoj, nun eĉ Esperanto-Goethe-stampo en GDR.

## GDR 14 – Potsdam

Sur historia grundo, en la iam kronprinca "Cecilienhof" de Potsdam, kunvenis de 26–28.2.1981 ĉirkaŭ 60 E-medicinstoj el GDR por preparoli la problemojn k laboron de la E-medicina Fakrondo ĉe EA/GDR. La nova prezidanto de MFR estas la malnova: D-ro Brosche, kiu ankaŭ membras en nia klubo.

Li iniciatis poŝtan memorigan stampon kun la germanlingva teksto

3. Tagung der Mediziner-Esperantisten

kaj kun la portreto de la germana filozofo Leibniz (1646–1716).

Leibniz okupiĝis ankaŭ pri kreo de universala lingvo kaj i.a. en sia "Opera omnia", aperinta 1768 en Geneve, skribis: "Mi certas, ke neniu eltrovaĵo tiel gravas kiel universala lingvo".

Tiu ĉi citaĵo ankaŭ estas trovebla sur memoriga koverto kaj sur poŝtkartoj kun nominaloj de 10 kaj 25 fenigoj.

## GDR 15 – Leipzig

En la kadro de la "Internacia Fojra Esperanto Renkontiĝo" (IFER 82) okazis simpozio pri vivo k verkaro de Goethe. 150 gesamideanoj el Francio, GFR, kaj el al socialismaj landoj bonvenigis novaspektan kaj vere interesan poŝtan memorigan stampon kun la portreto de Goethe kaj kun la teksto "Goethe-Faust-Leipzig/Esperanto-Messetreffen". La stampilo funkciis en publika giĉeto de la ĉefpoŝtejo Leipzig apud aliaj neesperantaj pri la foiro. (12–18.3.82) Sciigo kun foto pri tiu stampo aperis en la tutlanda gazeto filatela apud la informo pri aperigo de pm-bloko pri Goethe kaj fakte tiu E-stampo estas pli bela ol tiu unuataĝa, kiu nur enhavas tekston (neesperanta).

Ni menciis ĉi-loke, ke aperis poŝtkarto (10 fenigoj) kun la IFER 82 emblemo kaj ankaŭ memoriga koverto kun la sama alpresaĵo.

## La poŝtaj Esperantostampoj en GDR

N-ro	Urbo	Tempo	Okazo	Rimarkoj
1	Karl-Marx-Stadt	1967 6–15.10	80 jaroj E	40
2-1	Glauchau	1970 3–10.9	1a E-kgr de GDR	ms 39x22
2-2	Oschatz	1970 11–20.9	sama	ms 39x22
2-3	Wismar	1970 21–30.9	sama	ms 39x22
3	Leipzig	1979 9–14.3	IFER 79	40
4	Finsterwalde	1979 4–10.7	Med. E-konferenco (kun portreto de Galen)	vi/ni 40
5	Finsterwalde	1980 5–12.1	15 jaroj E en Kulturligo (kun portreto de Descartes)	40
6	Leipzig	1980 7–14.3	IFER 80	40
7	Karl-Marx-Stadt	1980 5–12.5	15 jaroj E en Kulturligo (kun portreto de Bacon)	vi/ni 40
8	Karl-Marx-Stadt	1980 5–11.6	Med. E-konferenco	40
	– fuŝdato:	1980 11.16	(kun portreto de Kalocsay)	
9	Leipzig	1980 15.12	Tago de E-libro	ni ms 39x22
	– reuzo:	1981 15.12	sama	vi ms 39x22
10	Leipzig	1980 15.12	Nuda inter lupoj	40
11	Finsterwalde	1981 5–12.1	3a IMEK	40
	– reuzo:	1981 1.7	(kun portreto de Richet)	
12	Leipzig	1981 13–15.3	IFER 81	40
13	Karl-Marx-Stadt	1981 16.4–24.5	75 jaroj Laborista E-movado (kun portreto de Renn)	vi/ni 40
14	Potsdam	1982 24.2–1.3	Med. E-konferenco (kun portreto de Leibniz)	40
15	Leipzig	1982 12–18.3	IFER 82 (kun portreto de Goethe)	40

Tiu ĉi listo vere estis necesa, ĉar nia plej freŝdata katalogo el la jaro 1978 montris nur n-rojn 1 kaj 2. Jam ĝermas la penso pri eldono de nova katalogo, kiu en manuskripto jam estas preta. Eblas diri jam nun, ke la nova renversos la ĝisnunan stamp-ordon ĉar sin interŝovis ĝis nun nekonataj malnovaj stampoj, kiuj plenmerite postulas siajn lokojn. Eble ni eĉ sukcesos montri ian sistemon de prezoj, konvenan por nia du- aŭ tripartigita mondo. Kiu el vi kuraĝas prezenti al la redaktoro prezproponojn lau punkto-sistemo? Por FI 1, SU 1, k.a. mi persone ekz. proponus po 100 punktojn, dum ekz. GDR 15 aŭ FRA 47 prezentus valoron de po 1 punkto. Kompreneble ni neniam sukcesos plene trafi la merkatajn valorojn de niaj stampoj, sed ni almenaŭ helpe de niaj ĝisnunaj spertoj klopodu alproksimigi nian "prezliston" al al merkataj prezoj, kiuj cetere ankaŭ sufiĉe oscilas.

### EFIR-stampo poŝta!

Kelkfoje jam ni pridiskutis sur la paĝoj de nia informilo tiun argentinan stampon el Rosario (1941). Nun nia kluba amiko Amouroux trovis la solvon: Laŭ "Esperanto Internacia" de majo-junio 1942, oficiala organo de "Internacia Esperanto Ligo (I.E.L.), la stampo ROSARIO 1941 estas poŝta!

Ni povas legi sur la paĝo 37:

Argentino: . . . La Asocio partoprenis en la Internacia Filatelia Ekspozicio, kiam, por la unua fojo en Argentino, oni uzis stampilon kun Esperanta teksto . . .

Do, estimataj, la nova poŝtstampa katalogo enhavas ankaŭ tiun ĝis nun nekonatan Esperantostampon. Atendos nin tutcerte novaj surprizoj, kiel montriĝis lastatempe. Tiel en n-ro 55 de nia informilo sur la paĝo 6 vi povis vidi tiun relative novan argentinan maŝinstampon JUVENIL DE ESPERANTO, kiu apud si havas duan maŝinstampon kun la E-teksto NGRESO ARGENTINO. Ĉu estas aparta aŭ ne stampo, ni ne scias. Ni nur posedas tiun fotokopion. Eble niaj klubaj geamikoj en Suda Ameriko solvos tiun problemon?



## GDR-E-pk suplementeto

22	Libro de Kantoj-Heine	10 pf. 1981-12	ES kiel 12
23	Eldiro Leibniz	10 pf. 1982-2	ES
		25 pf. 1982-2	ES
24	IFER 82	10 pf. 1982-3	ES

## Novaperontoj

En la jaro 1982 aperos almenaŭ 3–4 novaj E-pk en GDR. Ni jam scias pri tiuj pro Tago de E-libro 1982, pro regiona E-renkontiĝo en Dresden kaj propagandaj pk de MEM-sekcio en GDR.

## "Mondregistaro poŝto"

Dank' al la filatela ĉiusemajna gazeto LINN'S STAMP NEWS (20.4.81 kaj 1.6.81) ni nun scias, ke en Usono jam ekzistas MONDREGISTARO. Tiu MONDREGISTARO havas sian sidejon en iu ĉambro de la Atlantic Domo en Vaŝingtono. Kompreneble Mondregistaro bezonas ankaŭ tutmondan poŝtmarkon kaj tutmondan poŝtejon. Pro la simpleco oni instalas tiun poŝtejon tuj en la sama ĉambro de la Atlantika Domo, kie regas la Mondregistaro.

La Poŝta Ministerio de tiu Mondregistaro eldonis du poŝtmarkojn, kaj, ĉar eĉ verŝajne usona poŝto rifuzas rekoni tiujn markojn, oni ankaŭ eldonis UTK, kaj uzis nuligan stampon kun la teksto WORLD GOVERNMENT – POSTAL SERVICE, bedaurinde la Poŝta Ministerio forgesis la daton en tiu stampo.

Jen do la priskribo de tiuj "poŝtmarkoj":

La nominalo de "1 MONDO" prezentas ses lingvojn: araban, ĉinan, rusan, hispanan, anglan kaj Esperanton kaj oni notas sur ĝi: MONDREGISTARO POŝTO.

La nominalo de "50 CENDOJ" portas la saman tekston en ses lingvoj. Kaj tie oni forgesis la M en la teksto, tiel aperis ONDREGISTARO. Certe tiu eraro necesigos korektitan markon.

La prezo por unu kompleto estas same fantazia kiel la tuta eldonaĵo.

Ni kore dankas al nia kluba amiko Fisher, kiu sendis la eltranĉaĵojn. Bedaurinde mi ne scipovas la anglan kaj tial nur povis priskribi laŭ la ilustraĵoj.

Estimataj geamikoj, dike mi volus substreki, ke ne temas pri poŝtmarkoj, sed pri samaj stultaĵoj kiel ekz. la "pm" de la "Roza Insulo", aŭ de "Esperantopoŝto".

Kompreneble, niaj glumark-kolektantoj, se ili volus esti kompletaj, devus posedi tiujn markojn, tamen mi konsilus, nepre rezigni pri tiaj absurdaĵoj, eldonitaj sole kun la celo, tiri la monon el la poŝoj de stultaj kolektantoj.

*Esperanto*

Sprache für Europa  
und die ganze Welt



## Glumarka anguleto

Cindruletan vivon havas nia glumarka rubriko, sed feliĉe sin trovas nia kluba amiko Kurt Lindström en Svedio, kiu daŭre savas la vivon de nia glumarka anguleto. Dank' al li eblas hodiaŭ denove prezenti kelkajn novajn E-glumarkojn. Kaj krome ege min esperigas la novaliĝo de sinjoro H.F. Menges, kiu estas vera fakulo pri Esperanto-glumarkoj. Mi kore lin petas, peri liajn sciojn al la redaktoro de nia informilo. Kaj nun la iomete modesta anguleto pri glumarkoj:

- Kofro-etikedan glumarkon aperigis OKK de la XLI Hispana Kongreso de Esperanto en Murcia, 17a–22a Julio 1981. Cetere en tiu glumarko mi nombris 25 verdajn E-stelojn . . . Pri mezuroj kiel kutime mi ne volas enuigi vin.
- Ekzistas ankaŭ normalaj glumarkoj de tiu kongreso kun la sama desegno, kiun nia presejo cetere jam montris sur titola paĝo de nia informilo n-ro 53. Interese ankaŭ estas, ke ekzistas paroj, el kiuj unu peco estas kapstara.
- La OKK de la 55a SAT-Kongreso en IIsalmi aperigis kongresan glumarkon. En ĝi aperas kontraste al la supra nur unu stelo, kaj iom kaŝite, religia kruco. La glumarkoj estas presitaj po dek en unu folio.
- IFER 82 nin surprizis per rondformaj memgluaj markoj kun la jam konata simbolo pri IFER. Mi konstatis ilin en arĝenta kaj en ora koloroj. Haveblaj ili estis en folioj de po 8 pecoj.
- Pri IFER 82 ankaŭ ekzistas normalaj glumarkoj kun la simbolo kaj teksto pri IFER.
- Kaj per tio jam finas nia glumarka rubriko, kiel jam aliloke dirite: La amplekso de la informoj dependas de via emo kunlabori.

## Ankaŭ interesaj faktoj

La "Sammler-Express" n-ro 5/82, informilo de GDR-filatelistoj, listigis la 1981 aperintajn GDR-poŝtkartojn. En la grupo A ne aperis novaj poŝtkartoj, en la grupo B estas listigitaj 19 poŝtkartoj (eldonitaj laŭ mendo de Filatela Asocio GDR) kaj en la grupo C 29 poŝtkartoj. Inter tiuj C-kartoj estas 11 eldonitaj de Filatela Asocio de GDR, 5 apartenas al nia temo: Esperanto. Pri la ceteraj 3 el la jaro 1981 la filatelistoj ne eksciis.

Ili listigis Richet, IFER 81, Renn, 3a E-konferenco, kaj Bulgario.

## Nepre legu tion ĉi!

Montriĝis, ke nur tre malmultaj kutimas respondi demandojn, kiuj lokis en nia informilo. Tial ĉi-foje mi uzas alian metodon: La nuna problemo estas, ĉu nia klubo aperigu la esperantlingvan version de la Tutajkatalogo en formo de duobla numero de nia informilo, aŭ ne. Aperi ĝi nepre devas lige kun la 100-jara jubileo. Se ni ĝin aperigos kiel duobla informilo, tiam kompreneble vi ne ricevos en la jaro kvar informilojn, sed nur du plus tiun Tutajkatalogon. La manuskripto estas sufiĉe ampleksa.

Se vi tion ne konsentas, bonvolu tion sciigu al la redaktoro. Se pli ol duono de niaj klubaj geamikoj ne konsentas, tiam ni devus trovi alian vojon aperigi ĝin. Kelkaj niaj klubaj geamikoj havus teknikajn eblecojn por eldoni, sed estas grava financa problemo, eĉ risko. Iel ni solvos la problemon tutcerte. Mi atendas viajn proponojn aŭ proteston. Sammaniere ni povus aperigi ankaŭ novan stampokatalogon kaj eble eĉ pm-katalogon. Tiam ni en jaro 1984 disponus pri kompleta baza materialo por povi ĝustatempe komenci kompili ekspozitaĵojn. Tiu "plena E-filatela Katalogo" verŝajne nur restas bela sonĝo, kvankam ĝi estus vere impona, fake altkvalita, faklibro. Mankas eldonisto, ĝis nun.



## La E-pk de GFR

- 1949 10 pfenigoj (dutura pordego) verda, dekolora alpresio:  
GÖTTINGEN/GERMANA/ESPERANTO/KONGRESO  
3a-9a de Junio 1949 (nigra/verda)  
kun verda stelo, en ĝi bildo pri "Puto kun knabino". Atentu, ke vere poŝte uzitaj poŝtkartoj devas posedi ankaŭ surgluitan bluan impostan markon "2 BERLIN".
- 1978 40 pfenigoj (Burgo Eltz) verda, brunkolora alpresio:  
Servo per amikeco/Dienen/durch/Freundschaft  
Supre la emblemo de la International Police Association kun la enskribo "SERVO PER AMIKECO"

Certe ekzistas pliaj, sed ni tutsimple ĝis nun ne tro atentis ilin kaj sekve mi momente ne konas aliajn. Post konsulto de germana poŝtkarta eblos diri pli multe.

## E-pk ankaŭ en aliaj landoj

Ni volas atentigi, ke ni pritraktas jenajn ĝis nun neatentitajn (de ni E-filatelistoj) poŝtkartojn, kiuj portas surprisitajn normalajn poŝtmarkojn kaj alpresitajn (privatajn aŭ duonoficialajn) tekstojn kaj emblemojn esperantajn. Ni ne parolas pri "kartoj", do: sen enpresitaj poŝtmarkoj, ili ekzistas ja miloj da tiaj kun esperantaj tekstoj.

## Unu el du misterajoj malmisterita

Certe, malmisterita ne eblas diri en Esperanto (aŭ jes?), tamen ni solvis la enigmon el numero 54, paĝo 8. Fakte, kiel ni jam supozis, intencis temi pri nova Paderborna afrankstampo. Dum fruktedona interparolo, kiun havis la redaktoro kun nia kluba amiko Richard Hirsch dum IFER 82 en Leipzig, s-ro Hirsch informis pri tiu stampo. Jam pli frue li sciigis la aferon, sed tiu letero ne atingis la redaktoron. Ni klopodas montri bilde tiun novan afrankstampon, kiu akiros la katalogan pozicion AS 27 post la Brasschaata AS 26.

## Afrankstampa suplementeto

AS 26 1981	Brasschaat	TK STAFETO (C 2285)
AS 27-11981	Paderborn	Se temas pri lingvoj . . .
AS 27-21981	Paderborn	Sama kun "Drucksache"

## Novaperontoj

Laŭ sciigo de Richard Hirsch la afrankstampoj en FRG baldaŭ devas ŝanĝi sian aspekton, inter alie aperos la numero de la afrankmaŝino en la stampoj. Tio okazos pro nova dekreto de la poŝta ministerio kaj estas ligita kun sufiĉe altaj kostoj por la uzantoj de la afrankmaŝinoj.

## Ekspzicioj

Sinjorino Terttu Österman partoprenis kun sia E-kolekto en la ekspozicio okaze de la Kulturaj Tagoj de la urbo Salo en Finnlando. La ekspozicion vizitis ĉirkaŭ 1.500 homoj. En la komenco de tiu ĉi jaro ŝia ekspozajo troviĝis en la daŭra ekspozicio de la poŝtoŝeficejo en Lapeenranta. Ni kore gratulas al sinjorino Österman.

## Finnlando kun novaj stampoj

Sinjorino Pirjo Kotilainen, sekretariino de la OKK de la 55-a SAT-Kongreso en Iisalmi sciigis, ke de la 6.7. ĝis la 6.8.82 en la ĉefpoŝtejo de Iisalmi funkcios maŝinpoŝta stampo pri la SAT-Kongreso. En la kongresejo estos uzata la duan de aŭgusto poŝta memoriga stampo pri la kongreso. (Tiu poŝta stampo kostas al la mendintoj ĉirkaŭ 500 fmk.)

## Niaj stampoj

### Triesma kongreso por IDO

Estis nia kluba amiko Richard Hirsch kiu malkovris tiun de ni E-filatelistoj ĝis nun nekonatan E-stampon. Li trovis sciigojn pri ĝi en la "Katalogo de la germanaj porokazaj stampoj" kajero numero 11, eldonita de la poŝtstampoklubo "Rhein-Donau". Tiu katalogo, kiu konsistas el 35 kajeroj, kostas 200 gmk. Kaj en la rubriko "Kassel" troviĝas sub pozicio n-ro 12 tiu por ni ege interesa maŝinstampo, pri kiu eble eĉ ne scias la ldistoj/Esperantistoj, kiuj estas filatelaj fakuloj. Se ili tamen sciis, estus mirige, ke ili ne sciigis pri ĝi. Jen do la teksto de tiu stampo:

TRIESMA KONGRESO  
POR LA  
LINGUO INTERNACIONA  
= IDO =  
CASSEL, 4.-9.AGOSTO 1923

La katalogo citas ankoraŭ jenajn por mi nekompreneblajn indikojn: +7 A 23 kaj mankas informoj pri mezuroj kaj tempo de uzado.

Estas memkompreneble, ke tiun stampon ni envicigos en nian novan stampkatalogon. Demando nur estas, ĉu ĝi estos GER 1 aŭ GER 2. Miriga fakto por mi estas, ke tiu tria IDO-kongreso okazis samtempe kun la dekkvina Universala Kongreso de Esperanto en Germanio. Kiu do inter ni estos la unua, kiu ĝin akiros? Tiu stampo ornamus ĉiun filatelan ekspozajon pri la historio de Esperanto.

### Rumanaj stampoj

Fine de januaro nia kluba amiko doktoro Rosete! Prodanescu sendis sciigojn pri la rumana Esperantostampoj. Bedaŭrinde tiam mi jam forsendis manuskripton por 1/82, sed ankaŭ en tiu ĉi numero la informoj estas plene aktualaj:

R 1: 17-21.9.1981

R 2: 17-21.9.1981

R 3: 19.9.1981

Plie nia amiko informas, ke li tiujn stampojn ofertas interŝanĝe, ankaŭ sur la Argezi-tutaĵoj. La adreson vi trovas en la informo pri Tudor Argezi.

ESPERANTO-CENTRUM

Arsenaalstraat 5

B-2000 ANTWERPEN!








EXPO. KONGRES. ESPERANTO  
ORLEANS  
24-5 AU 1-6-82

ORLEANS 01 19-4-82



Kamaraio  
Ivar Paulsen





„Goethe  
Faŭst  
Leipzig“



Internacia  
Fajroartistista      Fajro  
Bunkovostigo

I F E R '82

12a 11a 10a 9a 8a 7a 6a 5a 4a 3a 2a 1a

67a UNIVERSALA  
KONGRESO DE ESPERANTO

JULIO      1982



ANTWERPEN